Scienca Revuo Vol.45 (1994)(1)—164

# PORGAZETARA NOVAĴANONCO

## De La Fondaĵo Por Premioj Por Ĝustaj Vivrimedoj

## [Right Livelihood Award Foundation]

POR DISDONO JE LA 6A DE OKTOBRO, 1993, 09.00 ATM

**La 1993aj PREMIOJ DE LA FONDAĴO POR ĜUSTAJ VIVRIMEDOJ REKONAS LA KURAĜON DE VIRINOJ EN KRIZO KAJ KONFLIKTO**

*Aktivulinoj de Israelo/Palestino, Zimbabvo, Hindio kaj Ŝoŝona Nacio estas honoritaj.*

La 1993an Premion de la Fondaĵo Por Ĝustaj Vivrimedoj pri US$ 200 000 dividos kvin virinoj aŭ organizaĵoj kiujn virinoj estras, kiuj faris elstarajn pozitivajn kontribuaĵojn en situacioj de krizo kaj konflikto:

1. **Arna Mer-Khamis** (Israelo) kaj la organizaĵo **Care and Learning** [Flegado kaj Lernado] kiun ŝi fondis en Jenin (okupita Palestino) por „kompatoplena sindediĉo al la defendo kaj eduko de la infanoj viktimigitaj de la milita okupacio". Lastatempaj eventoj ofertas esperon ke ŝia laboro servos kiel modela kontribuaĵo al vera repacigo inter la palestinaj kaj israelaj popoloj.

2. **The Organization of Rural Associations for Progress** (ORAP) [La Organizaĵo de Kamparaj Asocioj por Progreso] en Zimbabvo, kun-fondita de **Sithembiso Nyoni**, „por instigo al ĝia miliono da membroj elekti sian propran evoluan vojon laŭ siaj kulturo kaj tradicioj, kaj pro ĝia efika respondo al la plej longdaŭra senpluveco en Suda Afriko".

*Scienca Revuo* Vol.45 (1994)(1)—164

3. **Vandana Shiva (Hindio)**, medioprotekta aktivulino, advokatino kaj scienca esploristino, pro „ŝiaj pionira akravideco pri la sociaj kaj mediaj kostoj de la disvolva procezo, kaj pro ŝia kapablo labori kun kaj por la tie-aj popoloj kaj komunumoj en la priparolado kaj efektivigo de alternativoj". Shiva faris multon por meti virinojn en la centron de aktuala diskuto pri evoluo.

4. **Mary kaj Carrie Dann de la Okcidenta Ŝoŝona Nacio** de Nordameriko, por „ilia kuraĝo kaj persisto aserti la rajtojn de la indiĝenaj homoj al sia lando". Dum pli ol dudek jaroj la fratinoj Dann estis en la avangardo pri la lukto de sia popolo kontraŭ la provoj ekspropprietigi ilian landon fare de la usona registaro kaj kontraŭ la malplikvalitigo de ilia lando pro minado kaj provado de atomaj armiloj.

La premiojn oni prezentos kiel kutime en la Sveda Parlamento je la 9a de decembro, unu tagon antaŭ ol la prezento de la Premioj Nobel. (La Premiojn de la Ĝustaj Vivrimedoj oni ofte nomas la «Alternativaj Premioj Nobel».) Tiuj ĉi premioj enkondukiĝis en 1980 „por honori kaj subteni tiujn kiuj montras praktikajn kaj ekzemplajn respondojn al la plej urgaj defioj kiuj hodiaŭ frontas nin". La ideo venis de Jakob von Uexkull, sveda-germana filantropa spertulo, kiu vendis siajn altvalorajn poŝtmarkojn por provizi la originalan dotaĵon. Von Uexkull opiniis, ke la premioj Nobel fariĝis tro mallarĝaj kaj specialigitaj kaj ignoras multan laboron kaj scion esencan por la pluvivo de la homaro.

Estos gazetara konferenco kun la premiitoj en Stokholmo je merkredo, la 8a de decembro, 1993.

Por pli detaloj, komuniku kun:
**Right Livelihood Award:**
**Kerstin Bennett**
**(Administracia Direktoro)**
**Telefono: +46 (0)8-702 03 40**